


HORIZONTO

*KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO*

**6-a Jaro N-ro 33 (3)
Majo – Junio 1981**



LA PULSARO EN LA KRABA NEBULOZO

RENKONTE AL LA CENTJARA DATREVENO DE ESPERANTO

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

PARTIAJ ESPERANTO-INSTANCOJ EN UEA

HORIZONTO

KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA
NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO



Dumonata oficiala organo de la INTERNACIA
CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-
MOVADO (ICNEM).

Eldonata kaj presata de
ELDONEJO PERSPEKTIVO.

Ĉefredaktoro: *Jean Thierry*,
5 rue León Cogniet, F-75017 Paris, Francio.

Redaktoro: *H. V. Rasmussen*,
Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio.
Ĉiujn artikolojn kaj aliajn kontribuojn por la
revuo bonvolu sendi *nepre* al la ĉefredaktoro.
La redakcio rezervas la rajton mallongigi la
tekstojn kaj korekti la lingvon.

Abonojn akceptas la perantoj de HORIZONTO
aŭ rekte la ELDONEJO PERSPEKTIVO,
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio.
Postĉekkonto: Kopenhago 9 32 95 95.

Jara abono por ĉiuj landoj: 100 danaj kronoj
aŭ ronda egalvaloro. Tiu abono ne inkluzivas
membrecon de ICNEM. Vidu la antaŭlastan
kovrilpaĝon.

Por *recenzo* bonvolu sendi 2 ekzemplerojn, por
mencio 1 ekzempleron de libro aŭ broŝuro.
HORIZONTO akceptas ankaŭ *anoncojn*
laŭ la suba tarifo:

1/1 paĝo 200 dkr., 1/2 paĝo 100 dkr. kaj
1/4 paĝo 50 dkr.

ENHAVO

Renkonte al la Centjara Datreveno de Esperanto (Ivo Lapenna)	49
El "La nuda Vero" (Georges Salan)	51
La Pulsaro en la Kraba Nebulozo (Erik Høg) 54	
Esploro kaj Dokumentado (Ivo Lapenna) ..	57
Koncize el Partiaj Esperanto-organizaĵoj/ instancoj en UEA	63
Lingva Angulo	66
La Danĝeraj Koloro kaj Stelo: Verdaj	67
La Rusa Nomformo "L.M. Zamenhof" (Bernard Golden)	69
Miriga Dokumento (Richard Schulz)	71
Forpasis S-ino Mag. Anna Dratwer	72

Frontpaga bildo: La kraba nebulozo estas re-
staĵo de supernovaa eksplodo. La sago montras
la pulsaron centre de la pligrandiĝanta gasnebu-
lozo, kies diametro estas 10 lumjaroj. (V.p.54).

PERANTOJ

Aŭstrio:

D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz
Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 230 ŝil.

Britio:

Geoffrey King, 12 Elmer Close, Enfield Mid-
dlesex EN2 7EZ. Pĉk. 37.507.9106.

Jarabono: 7 anglaj pundoj.

Danio:

Eldonejo Perspektivo, Nørregårdsvej 91,
DK-2610 Rødovre. Pĉk. 9 32 95 95.

Jarabono: 100 d.kr.

Francio:

André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle,
F-75018 Paris. Pĉk. Paris 21.670.96 V.

Jarabono: 75 ffr.

FR Germanio:

Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773
Möhnesee-Gunne. Konto Nr. 31 377 450
Sparkasse Möhnesee (BLZ 414 514 85).

Jarabono: 33 DM.

Grekio:

Adda Sakellaroupoulou, Sokratous 88, Omo-
nia, Ateno 101. Jarabono: 380 dr.

Hispanio:

Luis Hernández-Yzal, D-ro Zamenhof St. 12,
San Pablo de Ordal (Barcelona).

Jarabono: 600 pesetoj.

Israelo:

Ben-Alter Jehiel, P.O.B. 379, Petah Tikva. Pĉk.
Bank Hadoar, 4-45854-8.

Jarabono: 120 shekel.

Jugoslavio:

Prof. d-ro Oton Pancer, Vočarsko Naselje 10,
YU-41000 Zagreb. Jarabono: 200 n.din.

Kanado:

Kriss Smilga, 34 Martin Road. Toronto Ont.
M4S 2V2. Jarabono: 20 dol.

Luksemburgo:

Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L-Olm. Pĉk.
54175-49. Jarabono: 540 lfr.

Nederlando:

Marianne Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70, I.R.
3015 BC Rotterdam Jarabono: 36 n.gld.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al la Administraci-
aŭ al unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en ti-
lando estos trovita.

GRAVA RIMARKO: Oni akceptas abonojn
nur por la tuta kalendara jaro.

La iniciatoro de la
Internacia Lingvo
(Esperanto)
D-ro L.L. Zamenhof



PROF. D-RO IVO LAPENNA:

RENKONTE AL LA CENTJARA DATREVENO DE ESPERANTO **(Tezaro de prelego farota al la 7-a Internacia Konferenco de N.E.M.)**

1. Enkonduko

Rapide alproksimiĝas la 100-jara datreveno de la Internacia Lingvo (Esperanto), genie iniciatita de D-ro L.L. Zamenhof. Kvankam, bedaŭrinde, pro la konataj kaŭzoj la Esperanto-Movado estas profunde dividita kaj tial ankaŭ malfortigita, tamen ekzistas ankaŭ aferoj de ĝenerala, komuna intereso. Unu el ili sendube estas la 100-jara datreveno de Esperanto en 1987. Ĝi devus kunligi absolute ĉiujn Esperanto-organizaĵojn: politike neŭtralajn, neneŭtralajn kaj malneŭtralajn, sendependajn kaj dependajn, fakajn kaj nefakajn, kiel ankaŭ la neesperantistajn instancojn kaj instituciojn, kiuj uzas la Internacian Lingvon por siaj celoj. La tuta 1987 devus fariĝi la Jaro de la Internacia Lingvo kun ĉiuflanka pritrakto de la lingva problemo en la nuntempa mondo kaj altnivela argumentado por radikala solvo pere de Esperanto. Tio samtempe devus kaŭzi plian, eble eĉ amasan disvastigon de la lingvo kaj de ĝia uzado en internaciaj rilatoj. Por ke la datrevena jaro estu digne kaj efike memorigita, necesas zorgi, celkonscie kaj ĝustatempe antaŭprepari ĝin. Tial nia Konferenco pritraktos la demandon en formo de prelegoj kaj detalaj diskutoj pri la unua skizo de la Agadprogramo por tiu unika historia kultura evento.

2. Precedentoj

Feliĉe, ne estas la unua fojo, ke la Esperanto-Movado organizas tiaspecajn agadojn. Tuj post la Dua Mondmilito UEA iniciatis la Peticion al Unuiĝintaj Nacioj (UN); en 1950-52 estis organizita tutmonda agado kun la celo jure devigi la Ĝeneralan Konferencon de Unesko enmeti la Peticion en sian tagordon, kio plene sukcesis; en 1952-54 okazis mondskala laŭplana kampanjo, kiu rezultigis la konsultajn rilatojn de UEA kun Unesko kaj la jam faman Rezolucion de Unesko de la 10-a de decembro 1954 favore al Esperanto; en 1957-59 realiĝis ĉiuj planitaj preparlaboroj por la celebrado de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof: unu el la multaj pozitivaj atingoj estis, ke Unesko deklaris D-ron Zamenhof "Unu el la grandaj personecoj de la homaro". Tiujn kaj pluraj aliajn similajn agadojn siatempe iniciatis kaj organizis UEA. Nun la iniciaton transprenis la **Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (la Centro)**, sed ĝi plene konscias, ke nur kunlabore kun UEA, SAT kaj kun ĉiuj aliaj Esperanto-organizaĵoj kaj -instancoj la giganta tasko povas esti sukcese realigita. En la prelego estos prezentita la kvintesenco de tiuj precedentoj, por ke oni povu iom lerni el la antaŭaj spertoj. Tiurilate aparte grava estas la *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro*, eldonita en 1960 de la tiama CED. Estas konsilinde trarigardi ĝin jam antaŭ la Konferenco.

3. Organizaj demandoj

Konforme al la spertoj akiritaj en la organizado de la Zamenhof-Jaro, la plej urĝa tasko estas formi kompetentan internacian komitaton, kies sola celo estos organizi la memorigon de la datrevena jaro. Ĝia nomo povus esti **Internacia Organiza Komitato por la Jaro de la Internacia Lingvo (Esperanto) 1987**, aŭ, pli mallonge, **Internacia Organiza Komitato por la Esperanto-Jaro (1987)**. La Komitato devus konsisti el reprezentantoj de ĉiuj internaciaj Esperanto-organizaĵoj kaj de ĉiuj institucioj aŭ instancoj, kiuj uzas la Internacian Lingvon. Dum sia unua kunsido, se eble jam en 1982, sed plej malfrue en 1983, la Komitato devus:

- (i) akcepti **Deklaracion kaj Alvokon** al la mondo okaze de la Esperanto-Jaro,
- (ii) akcepti **Bazan Agadprogramon**,
- (iii) iniciati la **formiĝon de INTERNACIA PATRONA KOMITATO** (nur plej elstaraj personecoj de la publika vivo: ŝtatestroj, ĉefministroj, Nobel-premiitoj, mondkonataj scienculoj, verkistoj, artistoj k.a. kulturaj agantoj),
- (iv) elekti sian **prezidantaron kun sekretariato** kiel organiza kerno de la tuta agado,
- (v) havigi la necesajn **financajn rimedojn** el diversaj fontoj por kovri la elspezojn,
- (vi) pritrakti aliajn organizajn demandojn,
- (vii) lanĉi la agadon kaj realigadi la **Agadprogramon** por atingi la kulminon dum la **UNUECA MONDA KONGRESO DE ESPERANTO meze de 1987**.

4. Skizo de Baza Agadprogramo

La unua skizo de la Baza Agadprogramo, publikigota en n-ro 4/81 de *HORIZONTO*, estos mallonge komentita punkton post punkto sur ĉiuj niveloj (internacia, landa, loka) kaj en fakaj medioj. Tute speciale estos pritrakitaj la eblecoj kaj dezirindeco de imponi **Monda Kongreso de Esperanto meze de 1987** en iu neŭtrala lando, facile alirebla por ĉiuj, plej taŭge en Svislando. Ĝi devus esti kongreso ne de tiu aŭ alia Esperanto-organizaĵo, sed unika monda kongreso de la tuta esperantistaro, eble 10-taga, kun aparta, jubilea, alte kultura programo, sub aŭspicio de la **Internacia Patrona Komitato**. Por maksimume sukcesigi la Mondan Kongreson, ĉiuj Esperanto-organizaĵoj devus rezigni pri siaj respektivaj internaj kongresoj kaj konferencoj en tiu jaro, kaj eventuale okazigi nur tre mallongajn kunsidojn en la kadro de la Monda Kongreso por solvi siajn plej urĝajn taskojn.

5. Konkludo

Per iom da bona volo la fundamenta ideo estas realigebla en la skizita formo, kompreneble kun la necesaj detaligoj kaj eventualaj amendoj. Komunaj aktivadoj reunuigus la dispecigitan Movadon almenaŭ ĉirkaŭ tiu speciala celo. Ĝi estas unika okazo por ĉiufanka, potenca manifestiĝo de la Internacia Lingvo en mondo, kiu ĉiam pli preme sentas la pezon de la lingva haoso en internaciaj rilatoj. En la intereso de Esperanto ni iniciatis kaj nun atendas la reagojn. Se nia iniciato estos malakceptita, alternative oni povus pripensi almenaŭ **komunan Bazan Agadprogramon, komunan Internacian Patronan Komitaton kaj komunan Mondan Esperanto-Kongreson**, lasante al ĉiu organizaĵo la taskon agi sendepende, laŭ siaj eblecoj, laŭ la tri bazaj dokumentoj. Se eĉ tio montriĝos nerealigebla, do ĉiu agu laŭ sia bontrovo. **LA INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO** en ĉiu okazo plenumos sian devon en la kadro de siaj eblecoj.

Prof. D-ro Ivo Lapenna



Unu el la celoj de la **INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO** estas manifesti la kulturajn kaj ĝenerale ideojn valorojn de la sendependa, partipolitike kaj religie neŭtrala Esperanto-Movado.

EI "LA NUDA VERO"

(travivaĵoj en naziaj koncentrejoj)

de D-RO GEORGES SALAN

Pro tia amasa mortado ŝajnas, ke la S.S.-suboficiro fine malkvietiĝas. Certe ne ĉar lia koro sangas, vidante ĉiujn tiujn kompatindajn kadavrojn amasiĝintajn en la kesto, sed eble ĉar li ektimas esti devigota, unu tagon aŭ la alian, ŝuldi konton al iu.

Sendube pro tio, iun matenon de la jarkomenco du S.S.-oficiroj, inspektoraspektaj, eniras enketcele nian barakon. Kelkaj indignaj ekkrioj de unu el ili, nin bone antaŭsentigas pri la sekvoj de tiu enketo. "Das ist ein scheiss Lager!" (Jen merda kampo!), aŭdas ni. Kaj estas S.S., kiu tiel parolas! ...

Du aŭ tri tagojn poste, oni al mi ordonas, ke mi pretigu ĉiujn malsanulojn de la malsanulejo por transporto, kaj ke mi al ili aldonu la plej marasmitajn de la "muzulmanoj" ⁽¹⁾ ĝis maksimumo de 200 homoj.

Ne estos facile tiun transporton konsistigi. Se la francoj kaj la rusoj volonte akceptas la kontrolon, ĉar ili estas konvinkitaj, ke ne ekzistas aliloke pli malbonaj vivkondiĉoj, la judoj male utiligas ĉiajn artifikojn por eskapi de ĝi. La vorto transporto ilin teruregas, ili fariĝas palegaj kaj tremaj. Ili ja estas absolute certaj, kaj nenia argumentado povas ilin deteni de tiu opinio, ke transporto de malsanulo devige kaj nepre alveturas al gasĉambro kaj krematorioj.

Tial obstinege, ruze, kaj kun senespera energio ili penas sin forsavi de la laborestro, kiu ilin ĉassekvas en ĉiujn angulojn, en kiuj ili sin kaŝas. Ne plu estas unu sola el ili, kiu sin diras malsana. La samaj, kiuj kutimas veni ĉiuvespere, post la labortago, en senfina vico, peti de mi, ke mi ilin prezentu al la S.S. flegisto por ke ĉi tiu ilin laborliberigu, kio tutcerte estus tute pravigita pro iliaj kruroj tiel edemŝvelintaj, ke ili ne plu kapablas marŝi, nun kuras antaŭ ni kun lasta energia ekskuiĝo por iluziigi, ke ili ankoraŭ ion kapablas.

Sed la laborestro ilin ĵetas teren manpuŝe por publike pruvi ilian elĉerpiĝon.

La dimanĉon 7-an de Januaro, kvin luksaj aŭtobusoj sin ordigis sur la alvokoplacon. Niaj ducent malsanuloj kaj muzulmanoj estis ene instalitaj. Mi akompanis la transporton kun la S.S.-flegisto.

Por la unua fojo, de tre longa tempo, mi veturis en komfortaj kondiĉoj, kaj mi kontaktiĝis kun vivo libera kaj civilizita.

(1) En ĉiuj kampoj oni tiel nomis la elĉerpitajn punlaborulojn.

Tra la fenestroj mi vidis la kampojn etendiĝantajn ĉiufланke de la vojo ĝis nevidebleco, mi rimarkis kamplaborulojn kaj militkaptitojn irantajn lant-paŝe sur la plugaj kampoj. Ni renkontis militajn transportojn, ni traveturis vilaĝojn, kie buboj ludis sur publikaj placoj. El ĉio tio eliĝis ebriiga li-berparfumo.

Bedaŭrinde mi ne havis multe da tempo por ĝui tiun spektaklon, ĉar mi sen-ĉese estis distrita el ĝi de muzulmano sidanta apud mi. Estis judo ĉirkaŭ tri-dekjara, kiu tute evidente estis mortiĝonta. La korpo kunpremita en la fotelo, la busto antaŭen klinita, la kapo falinta sur la bruston, la vizaĝo kvazaŭ fre-neza, la okuloj fiksitaj, la dilatiĝintaj pupiloj, la lantaj kaj solenaj gestoj, ĉio en li konigis la baldaŭan morton al la specialisto de tiu speco de trage-dio, kiu mi estis fariĝinta. Li tenis enmane panpecon kaj lante maĉis kiel aŭ-tomato ĉiam la saman buŝplenon, kiun li neniam englutis. La pano iafoje eska-pis el liaj manoj kaj teren ruliĝis. Li tiam sin antaŭen klinis kaj liaj blin-daj manoj serĉis inter liaj kruroj la perditan trezoron. Li fine ĝin trovis kaj sin rerektiĝis, tamen iom pli kunpremita, tenante inter siaj krispiĝintaj fin-groj tiun makulitan panpecon, por kiun manĝi li jam ne plu havis sufiĉe da for-to. Ĉiumomente falis la pano, ĉiumomente tiu mortiĝonto obstinis ĝin rekapti.

Neniam, kiel tiun tagon, mi sentis je kia grado nia vivo dependas de la pa-no.



Ni veturis jam de duonhoro kiam, vojflanke, ni ekvidis senfinajn pikdratajn ĉirkaŭbarilojn, entenantajn gvatturojn kaj individuajn betonŝirmejojn por la gardostarantoj. Pli malproksime estis distingeblaj vicoj da barakoj.

Ni estis alvenintaj en Salzgitter-Wattenstedt, kampo situanta je dudeko da kilometroj de Braŭnschweig, en kiu estis enfermitaj la sklavoj de Göring.

Mi devis tie lasi miajn malsanulojn. Oni atendis ilin en la kampmalsanulejo troviĝanta en vastaj kaj belaj ĉambroj, kiuj rilatis al nia Braŭnschweiga pork-ejo, kiel kastelo al cigana loĝveturilo.

La mastro de tiu kastelo estis pola kuracisto, pri kiu mi nenion jam sciis, krom lia antaŭnomo: Moritz.

Dum oni malŝarĝis mian transporton, mi aŭdacis ĉirkaŭiri la najbarajn bara-kojn. Mi estis sur ia vasta senarba altebenaĵo ventobalaita, el kiu oni ĝuis larĝspacan perspektivon. Malproksime, kvazaŭ kaŭrantaj en valetoj, fornegoj kaj instalaĵoj de grandampleksa metalurgio ŝajnis ŝpruci el la tero. Tie la skla-voj uzinis la obusojn de la firmao Hermann Göring.

Mi ne havis tempon por plene ĉui la ebriligon de la vento sur tiu vasta ebenaĵo: la malŝarĝo estis finita, necesis reveturi al nia haladza loĝejaĉo.

Moritz min informis, ke jam estis unu mortinto inter la alvenintoj kaj ke mi devas lin realporti al Braŭnschweig. Mi iris lin rericevi.

Estis la judo kun la panpeco.



AMNESTIO INTERNACIA 20-JARA

Kiel vinjeton de la supra rakonto el *La Nuda Vero* ni uzis la simbolon de *Amnestio Internacia (AI)*, la tutmonda organizajo, kiu laboras por liberigi la t.n. prokonsciencajn malliberulojn au mildigi iliajn kondicojn.

La falo de la nazia regimo nek signifis finon de arestado de homoj sole pro iliaj politikaj kaj religiaj konvinkoj, nek finon de mallibereco je malhumanaj cirkonstancoj, torturado kaj murdado. En ciuj mondpartoj okazas severaj malobservoj al la *Homaj Rajtoj*, kontraŭ kiuj malobservoj batalas AI, tial meritanta atenton kaj almenaŭ moralan subtenon de la partoprenantoj de la *Neŭtrala Esperanto-Movado*, kies baza ideo estas *Humaneca Internaciismo*.

Tion esprimis la *Manifesto 77 de la NEM* kaj la telegramo de la *3-a Internacia Konferenco de NEM* al prezidento *L.I. Breĵnev* pri apogo al la klopodoj de AI por liberigi la esperantiston *Jurij S. Belov*, kiu tiam estis tenata en psikiatria hospitalo en Siberio.

La prezidanto de la *Internacia Centro de NEM*, Prof. D-ro Ivo Lapenna, ofte kontribuas al AI per konsiloj pri soveta kaj orienteŭropa juro.

AI estis fondita la 28-an de majo 1961, kaj *Horizonto* je tiu okazo esprimas sian sinceran gratulon al AI kaj dezirojn pri sukcesaj rezultoj de ĝia agado.



La Kopenhaga Observatorio

D-ro ERIK HØG (48 j.) studinte astronomion en la Universitato de Kopenhago laboris dum 15 jaroj en la Observatorio de Hamburgo, de kie li revenis en 1973. Li doktoriĝis en 1978 kaj estas lektoro de astronomio en la Universitato de Kopenhago kaj prezidanto de la Komisiono pri Pozicia Astronomio de la Internacia Astronomia Unio.

D-ro Erik Høg prelegos pri astronomia temo al la 7-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Humlebæk.

LA PULSARO EN LA KRABA NEBULOZO


En februaro 1968 anglaj radioastronomoj informis, ke nova klaso de astroj estis trovita. Tia astro elsendas kun alta precizeco intermitajn pulsojn de radioondoj. La tempo inter du pulsoj de la unua tiaspeca astro, nomata pulsaro, estas 1,337 301 109 sekundoj, kaj ĝi egalas al unu revoluo de la stelo.

La malkovro de la pulsaroj certe estis la plej surpriza fizika novaĵo de la jaro 1968. Ankaŭ la malkovro en 1969 de la unua pulsaro, kiu elsendas optikan lumon, estis sensacio, ĉar tiu estas stelo observita jam en la jaro 1054 p.Kr. de ĉinaj astronomoj. Ĝi estas "supernovao", 3000 lumjarojn malproksime en la konstelacio Taŭro, kaj hodiaŭ eĉ per granda teleskopo nevidebla al la okulo, sed kaptebla per fotografado. En tempa kaj spaca skalo ĝi estas la plej nenormala stelo el ĉiuj ajn.

Kiel restaĵo de la eksplodo de supernovao aperas nun la Kraba Nebulozo (vidu bildon 1 sur la frontpaĝo), kies lumo ie estas tre polarizita. Tia lumo venas ne el atomoj kiel en ampolo aŭ lumtubo, sed el liberaj elektronoj, kiuj moviĝas preskaŭ lumrapide tra magneta kampo. Ĝi nomiĝas sinkrotrona radio.

La nebulozon oni jam delonge konis kaj studis kiel certan restaĵon de la eksplodo, sed ne estis certe, ĉu iu el la steloj videblaj sur la foto fakte estas en la interno de la nebulozo mem aŭ troviĝas je alia distanco. Sed la 16-an de januaro 1969 usonaj astronomoj mezuris, ke la stelo montrita per sago sur la frontpaĝa bildo elsendas optikan lumon, ne nur radioondojn, kiel radioastronomoj konstatis du monatojn antaŭe.


Oni supozas, ke sur la surfaco ekzistas ia direktita lumigilo, kiu trafas la Teron unufoje dum ĉiu revoluo de la pulsaro. La malkonstantecon de la alventempoj oni komprenas kiel rapidan ŝanĝiĝon de la rotacio de la stelo.



Bildo 2. Lumkurbo de la Kraba Pulsaro observita per la 60 cm refraktoro de la hamburga universitato. Oni kalkulis meznombrojn dum 20-minuta observado de 40 000 periodoj. Videblaj estas la ĉefpulso kaj 0.013 sekundojn poste la flankpulso. La aliaj ŝanĝoj estas kaŭzitaj de la statistika distribuo de la lumkvantoj.

Bildo 2 montras la variadon de la lumintenso dum la periodo. Pro la ega tempa konstanteco de la periodo oni povas per la observado mezuri la tempon mem de la alveno de la pulso. Tiuj alventempoj estas mezurataj en pluraj observatorioj de la mondo. La unua observatorio en Eŭropo estis en Hamburgo, kie mezurilo konstruita de la aŭtoro de tiu ĉi artikolo estis uzata. Per serioj da tiaj observoj oni rimarkis, ke la periodo tamen ne estas tute konstanta.

La fizikajn kondiĉojn de la interno de pulsaro oni ne precize komprenas. Ili prezentas ankoraŭ interesajn enigmojn al fizikistoj de elementaj partikloj. La sekvanta modelo de la pulsaro (Bildo 3) do ne estas tutcerta en detaloj:



Bildo 3. Simpla modelo de pulsaro. La kerno estas fluida, kaj la krusto estas rigida. La platiĝo de la rotacianta korpo estas ege troigita. La lumelsendo el lumigilo sur la surfaco estas nur laŭ principo kompreninda.

La diametro estas 10 km, la maso kiel tiu de la Suno; tio signifas, ke unu kubikcentrimetro pezas tiom kiom 100 000 lokomotivoj. La krusto estas metalsimila substanco el atomkernoj kaj liberaj elektronoj, dum la kerno estas fluida kaj konsistas el neŭtronoj. La grandega premo (100 trilionoj da atmosferoj) enigigas la plej multajn elektronojn en la protonojn, tiel kreante la neŭtronojn, la elektre neŭtralajn erojn de atomkernoj.

La elektre konduktiva pulsaro enhavas magnetan kampon, kiu interrilatas kun la plasmato de la nebulozo ĉirkaŭ la pulsaro, kiu tial bremsiĝas kaj dum ĉiu tago faras tri revoluciojn malpli ol dum la antaŭa tago.

La ŝanĝiĝoj de la alventempoj nun montras, ke la bremsiĝo ne estas tute regula. Kiam ronda korpo rotacias, ĝi fariĝas pli dika ĉe la ekvatoro kaj platiĝas ĉe la polusoj; tion ni ja konas de la Tero. Kiam la korpo bremsiĝas, la polusaj regionoj malpliplatiĝas, sed kompreneble nur, se ĝi estas sufiĉe fluida aŭ mola kaj povas cedi. Ĉe la pulsaro la fluida interno povas iom post iom cedi, sed la ekstera kristala krusto povas nur eksalte cedi. Kiel tensio de la terkrusto kaŭzas tertremojn, tiel sur la pulsaro steltremoj okazas, kaj ĝuste tion montras la ŝanĝiĝoj de la alventempoj.

(Daŭrigo sur p. 68)

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro IVO LAPENNA

N-ro 22 (*Daŭrigo de n-ro 32 (2), p. 39, pkt. 45.3*)

Plagiato, kiu ĉie en la civilizita mondo estas rigardata kiel kultura skandalo, en la organo de UEA estas laŭdata kiel granda atingo. En ĉiu okazo unu afero estas certa: "antaŭ deko da jaroj" tiaj skandaloj ne nur ne estis "raraĵo", sed ili tutsimple ne okazadis. Kaj se hazarde tiaj aferoj entute estus povintaj okazi, sendube ili estus ne laŭdataj, sed plej firme kritikataj kaj kontraŭbatalataj. Ĉiu el ni - tutcerte mi mem - kiuj dediĉis multe da tempo por la disvastigo de Esperanto, ĉiam volonte donus la permeson aperigi niajn verkojn traduke aŭ ĉerpi el ili por nacilingvaj artikoloj aŭ eĉ libroj. Tio estas unu afero. Tute alia afero, forte kondamninda, estas kaŝe plagiati kaj prisilentadi la aŭtorecon.

45.4. Konklude

Ne estas dubo, ke la informado pri la Internacia Lingvo ne ĉesis malgraŭ la kompleta pasiveco de UEA en tiu afero. Feliĉe, plu troveblas kaj kelkaj Esperanto-organizaĵoj kaj unuopuloj, kiuj inteligente kaj efike aktivas observante la konsilojn entenatajn en la *Fundamenta Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo* (Frostavallen, 1956), rekomendita almenaŭ formale eĉ de la nuna gvidantaro de UEA. Same tiel ne estas dubo, ke la plej bonaj posthamburgaj artikoloj kaj informoj - tute egale ĉu plagiatoj kaj intelektaj ŝteloj, aŭ honeste indikantaj la fontojn kaj rekonantaj la aŭtorecon - baziĝas ĉefe sur libroj, studoj, artikoloj kaj CED-dokumentoj verkitaj antaŭ 1975, multaj el ili, inkluzive la *Principaron de Frostavallen*, eĉ longe antaŭ la jam fama "deko da jaroj". Aliflanke, kreskanta nombro da fuŝaĵoj bedaŭrinde ĉiam pli malutilas al la lingvo kaj ege kompromitas ankaŭ tiurilate la Esperanto-Movadon. Konklude: por ĉiu, kiu eĉ nur iom konas la faktojn, plian fojon ne povas esti dubo, ke grandega estas la diferenco inter la iama organizita sistemo de vasta kaj alt-nivela monda informado pri Esperanto, gvidata kaj helpata de la tiama Informa Fakto de UEA, kaj la nuna anarkia stato, kaŭzita de plena neglekto de tiu grava agadbranĉo fare de la respondecaj instancoj de UEA. Anstataŭ blufadi kaj klopodadi transformi fuŝaĵojn en sukcesojn, la Estraro de UEA agas saĝe, se ĝi sincere konstatus la realaĵon kaj trovas eliron el la nuna negativa situacio, des pli ke la vera 100-jara datreveno de Esperanto rapide alproksimiĝas.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.5.3 de *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo* (EeP).

46. DU PLIAJ NACILINGVAJ TRADUKOJ EL ESPERANTO

46.1. Faka Studo en la Japano

La artikolo de Prof. D-ro I. Lapenna "Kelkaj Juraj Aspektoj de Multlingveco en EEK", originale verkita en la Internacia Lingvo kaj unue publikigita en *Internacia Jura Revuo*, n-ro 2/77, estis poste represita en *Paderborner Arbeitspapiere* de La Instituto pri Kibernetika Pedagogio en Paderborn. De tie ĝi estis represita en *Eŭropa Dokumentaro*, n-ro 22/79. En franca traduko ĝi aperis ankaŭ en *Documents pour l'Enseignement*, n-ro 29/79. Nun Japano Esperanto-Instituto eldonis ĝin en la japana traduko de Yoshimi Umeda. Pro la nuntempaj plagiatoj kaj intelektaj ŝteloj (v. en *Horizonto* n-ro 32(2), p.39) estas utile diri, ke ĉiuj menciitaj represoj kaj tradukoj estis faritaj kun la aprobo de la aŭtoro.

46.2. Du Ĉapitroj el EeP en la Nederlanda

En 1980 aperis broŝuro *Het Talenproblem in Internationale Relaties en De Internationale Taal (Esperanto) / La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj kaj la Internacia Lingvo (Esperanto)* en traduko de Marc Vanden Bempt, eldonita de Esperanto 2000, Leuven. Temas pri nederlanda traduko de la unuaj du ĉapitroj en la libro *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo*, verkitaj de la redaktoro de tiu ĉi rubriko kaj plene bazitaj sur ĉap. 3-4 kaj 6 de lia *Retoriko*.

El teknika vidpunkto la 50-paĝa broŝuro prezentiĝas tre bone. Bedaŭrinde plian fojon la traduko estas farita kaj publikigita sen mia konsento aŭ kia ajn antaŭa scio. Pro tiu nova malobservo de miaj aŭtoraj rajtoj mi sentis min devigita sendi protestan leteron al la C.O. de UEA kun kopio al la prezidanto, s-ro G. Maertens, kaj al Prof. D-ro Carlo Minnaja, komitatano de UEA jam bone informita pri la antaŭaj malobservoj de miaj aŭtoraj rajtoj fare de la nuna UEA. Malgraŭ la interveno de Prof. Minnaja, kiel kutime en la posthamburga UEA la protesto restis seneŝa. Nur tiom, principe, el morala kaj jura vidpunktoj. Alia afero estas, ke tre verŝajne mi estus doninta mian konsenton por tiu traduko, kiel mi ĉiam faris en la pasinteco, sed kompreneble sub la kondiĉo, ke la traduko estu lingve senripoĉa kaj ke la aŭtoreco estu korekte indikita. Kvankam mi ne scias la nederlandan lingvon, tamen mi povis konstati almenaŭ jenajn gravajn erarojn:

(i) *Esperanto en Perspektief* sur la titolpaĝo de la broŝuro ne estas kompleta, ĉar estas ellasita *Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo*, esenca parto de la originala titolo de la verko.

(ii) Estas misprezento indiki sur la titolpaĝo, ke la traduke publikigita parto estas verkita de mi mem, U.Lins kaj T.Carlevaro, ĉar la du kunaŭtoroj de *EeP* skribis eĉ ne unu vorton por tiu parto, kiel klare indikite sur p.iv de *EeP*.

(iii) Nenie estas indikite, ke mi estas la ĉefredaktoro de *EeP*.

(iv) Sur p. 7 estas dirite, ke mi estas profesoro de kompara rusa kaj orienteŭropa juro, dum mi fakte estas profesoro de soveta kaj orienteŭropa kompara juro, kiel klare indikite en la originalo. Inter rusa kaj soveta juro estas grandega diferenco.

Se oni povas rimarki tiom da eraroj sen scio de la nederlanda, oni necese suspektas, ke multaj aliaj troviĝas en la teksto mem, sed oni ankaŭ povas esperi, ke ne estas tiel. Kaj se vere ne estas tiel, la nederlanda traduko estas fakte plia pozitiva kontribuo de aŭtoro de multe pli ol nur "antaŭ deko da jaroj" (v.en *Horizonto* n-ro 32(2), p.35-37), kiu plu laboras laŭ la samaj principoj kaj sciencaj metodoj en la kadro de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 7.4.1 de EeP.


47. PROFESIA PERIODAĴO KUN UNIKA ESPERANTO-PAĜO

La monata grandformata periodaĵo *ZET*, organo de la Zagreba Elektra Tramo (Jugoslavio) jam dum tre multaj jaroj regule publikigas tutan paĝon kun kroatlingvaj novaĵoj el eksterlando kaj internacilingvaj informoj pri la zagreba tramo. Tiun paĝon iniciatis kaj plu redaktas la malnova jugoslavia aktivulo Zvonko Rehorić. Pluraj kunlaborantoj el deko aŭ pli da landoj tradukas interesaĵojn pri tramo kaj entute pri la urba trafiko el siaj naciaj periodaĵoj kaj taggazetoj en Esperanton, sendas la tradukojn kun taŭgaj fotoj al la redaktoro, kiu retradukas en la kroatan kaj publikigas en *ZET*. La esperantlingva parto konsistas el ĉiaspecaj informoj pri la Zagreba Elektra Tramo: de teknikaj plibonigoj, vastigo de la tramreto, novaj veturiloj, k.s. ĝis salajroj kaj loĝproblemoj. Tiu paĝo tute ne estas "propagando" en la vulgara senco de la vorto, sed ĝi taŭge utiligas la Internacian Lingvon por profesiaj celoj kaj tiel, aldone kaj sen altrudo, kontribuas al disvastigo de Esperanto.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 12.8 kaj 7.4.1 de EeP

★ ★ ★

HORIZONTO kaj la INTERNACIA CENTRO de N.E.M. laboras sen salajrataj oficistoj kaj sen subvencioj de kiu ajn flanko. Viaj abono al HORIZONTO kaj aliĝo al la CENTRO estas la solaj enspezoj, kiuj ebligas la regula aperadon de HORIZONTO.

	OFFSET/REPRO/COPY
	ESKOFOT A/S
	35-37 Industriparken
	DK-2750 Ballerup-Denmark
	Telephone 02-974400
	Telex 35156 esko

PIERRE GABORIT

Bildo devas kapabli igi vortojn superfluaj. Tamen oni povas evoluigi la pensojn paralele al la mana laboro.

Ĉu estas proksima aŭ malproksima interrilato inter tiuj ĉi bildoj kaj la vortoj akompanantaj ilin, mi ne povas mem prijuĝi.


Post fino de la laboro la bildoj kaj la vortoj povas stari solaj aŭ en reciproka rilato inter si.

pg.



La skulptisto kaj pentristo **PIERRE HENRI PAUL GABORIT**, naskita 4.12.1924 en Poitiers (Vienne), Francio. Edukita surbaze de surrealismo kiel skulptisto kaj pentristo en Poitiers (Vienne) 1938 - 43, respektive Parizo 1946 - 48 kaj Kopenhago 1960 - 61.

Pluraj verkoj de *Pierre Gaborit* estos ekpoziitaj en Altlernejo Krogerup dum la 7-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, kies partoprenantojn li ankaŭ gvidos tra *Louisiana*, la mond-fama muzeo de moderna arto, najbare al la altlernejo.



P. Gabor

*La dometo de mia nostalgio
estis nur branĉeta nesto.*

Kupra gravuraĵo.
Vortoj kaj gravuro de Pierre Gabor

48. REKORDA MEMBRONOMBRO DE UEA: PLIA REKORDA BLUFO

Sur p. 59 de la marta n-ro de *Esperanto* (1981) aperis la kutima statistiko pri la membraro de UEA en 1980. Per dikaj literoj sur la sama paĝo la redakcio skribas pri "rekorda membronombro", kaj la samon ĝi emfaze ripetas en la redakcia noto sur la interna kovrilpaĝo.

Ĉu vere rekorda membronombro aŭ plia rekorda bluf? Pri kio, fakte, temas?

Laŭ la publikigita statistiko, UEA havis 6629 individuajn membrojn (IM) en 1980. Tio estas iom pli ol en la antaŭa jaro (1979) kaj nur 86 pli ol en 1974, kiam pro la hamburgaj eventoj la nombro de individuaj membroj tuj terure falis de 7231 en 1973 al nuraj 6543. Signifas, ke en 1980 UEA plu havis 602 IM malpli ol en 1973, la lasta antaŭhamburga jaro. Ĉu rekordo?

Plue, laŭ la menciita statistiko, UEA havis 20490 asociajn membrojn (AM) en 1980. En 1973 ĝi havis 22379 AM kaj 25390 en 1972. Do, kompare kun 1973 perdo de 1889 AM, kaj kompare kun 1972 perdo de 4900 AM. Evidente, pliaj "rekordoj".

Kiel, do, la redakcio de *Esperanto* tamen elmanipulis sian "rekordon"? Tutsimple tiel, ke ĝi aldonis 7064 t.n. junajn asociajn membrojn al la 20490 AM, do entute 27554, kio, kune kun la 6629 IM de UEA, donas la "rekordan" ciferon de 34183. La vero estas, ke antaŭ 1974 la membronombro de la junulara sekcio - arbitra kaj nekontrolebla pro la konataj kaŭzoj - neniam estis aldonata al la nombro de asociaj membroj de UEA. Ekzemple, laŭ la Raporto de TEJO por 1973, ĝi havis en tiu jaro 9243 membrojn. Se la tiama Estraro de UEA estus aldoninta tiujn arbitrajn ciferojn al la nombro de AM de UEA, la tuta membronombro en 1973 estus 38853, en 1972 eĉ 44311, kio abunde superus la nunan "rekordon" de 34183.

Ĉiuj supraj informoj estas facile kontroleblaj el la marta n-ro de *Esperanto* (1981) kaj el la Estraraj Raportoj por 1973 kaj 1972. En la Raporto por 1973 mi mem kiel tiama prezidanto de UEA eksplacite distancigis min de la nefidindaj informoj en la Raporto de TEJO, "ekzemple de la informoj rilate la membronombro" (Jarlibro de UEA, 1974, Dua Parto, p.66). Ĉu la nuna prezidanto de UEA agos same, aŭ li, kune kun la tuta Estraro, solidariĝos kun tiuj blufaj "rekordoj" kaj rekordaj blufoj de sia senrespondeca redakcio? Kaj kiom longe la membraro de UEA ankoraŭ toleros tian misinformadon? Eble, tamen, troviĝos almenaŭ kelkaj, kiuj postulos de la prezidanto honestan prezenton de la fakta stato. Ne nur tiurilate.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.5.3 kaj 18.7 de EeP.

ALVOKO: Personoj, kiuj povas kompetente kontribui per fidindaj informoj pri esploroj kaj dokumentado en la kadro de la demandoj pritraktitaj en *EeP*, bv. sendi siajn komunikojn, apogitajn, se iel eble, per fotokopioj de originalaj dokumentoj, al la redaktoro de tiu ĉi rubriko.

KONCIZE EL PARTIAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ/INSTANCOJ EN UEA

PLIA KONSULTIĜO DE LA BLOKAJ ESPERANTO-ORGANIZAĴOJ

La 13-a "Konsultiĝo" de Esperanto-organizaĵoj/instancoj el la landoj de la soveta bloko okazis en Sofio (Bulgario) de la 18-a ĝis la 23-a de aprilo 1980. Partoprenis reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj aŭ instancoj el Bulgario, Ĉeĥio, Slovakio, Pollando, Hungario, GDR (sekcio de la ŝtata-partia Kulturligo), Soveta Unio kaj la t.n. Vjetnama Pacdefenda Komitato. Kun la escepto de la du lastaj, ĉiuj estas "aliĝintaj asocioj" de UEA.

Kiel konate, tiuj "konsultiĝoj" estas nenio alia ol aparta politika instanco en UEA, ne antaŭvidita en ĝia Statuto, eĉ ne en la nuna, kontraŭa al la principo de neŭtraleco. La ĉefa celo de la "konsultiĝoj" estas difini la politikon de tiuj blokaj organizaĵoj kaj instancoj rilate al UEA konforme al la partipolitika linio de la bloko, kelkfoje laŭ rektaj instrukcioj de la politikaj instancoj ekster la Esperanto-Movado. Pro la granda nombro de iliaj membroj en la Komitato de UEA, pro la apogo de kelkaj pliaj komitatanoj-kunvojaĝantoj kaj pro la pasiveco de la aliaj, la "konsultiĝoj" decide influas la sorton de UEA en ĉiuj iom gravaj aferoj. Ekzemple, la Konsultiĝo de 1974, okazinta senpere antaŭ la UK de Hamburgo, fintraktis la detalojn de la konata puĉo; aliaj "konsultiĝoj" fine rezultigis la akcepton de la nuna kontraŭneŭtraleca Statuto de UEA; la 13-a Konsultiĝo verŝajne decidis pri akceptebla prezidanto de UEA, aŭ almenaŭ pri la persono, kiu por la bloko estas neakceptebla, kaj pri la aliaj estraranoj, ktp.

Oni sciiĝas el la Esperanto-periodaĵoj de la blokaj landoj, ke tiu aprila Konsultiĝo decidis "sisteme pretigadi *politike*, lingve kaj fake kapablajn funkciojn kaj aktivulojn de la Esperanto-Movado en la unuopaj landoj..." (emfazita de la redakcio). Aldone al kelkaj politikaj resolucioj, tio estas ĝia plej grava decido: tiel klara, ke komento estas superflua.

"LA REVOLUCIO ANTAŬEN MARŜAS"

Sub tiu titolo *der esperantist*, organo de Centra Laborrondo Esperanto, sekcio de Kulturligo de GDR kaj samtempe "aliĝinta asocio" de UEA, informas pri la parolado de Vu Kan dum la 13-a Konsultiĝo de la Esperanto-organizaĵoj/instancoj de la blokaj landoj en Sofio. La reprezentanto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Komitato precipe forte atakis PR Ĉinion. Li diris, ke "post la bankroto de la usona novkoloniismo tuj ekaperis nova malamiko: la ekspansiismo kaj la hegemoniismo de la granda nacio de Pekino". Oni ankaŭ sciiĝas, ke "la maŭistoj de la metropolo ordonis al siaj lakeoj Pol Pot/Jeng Sary okazigi nedeklaritan

militon kontraŭ Vjetnamio, ĝuste kiam nia lando estis komplete liberigita..".
Ktp. laŭ la sama linio.

Kun intereso ni atendu por vidi, ĉu Ĉina Esperanto Ligo aŭ *El Popola Ĉinio* reagos per politikaj kontraŭargumentoj je tiuj daŭre publikigataj atakoj, kaj ĉu en la sino de UEA estontece okazos politikaj disputoj anstataŭ kiel ĝis nun post Hamburgo nur unuflankaj politikaj atakoj.

PLIA KONTRAŬĈINIA REZOLUCIO

La 21-an de aprilo 1980 la reprezentantoj de la Esperanto-organizaĵoj/instancoj de la blokaj landoj (v. supre la liston) akceptis Rezolucion, kompreneble unuanime, en kiu oni ekzamenas "la streĉan situacion, kiu kreiĝis en Hindoĉinio kaŭze de la grandpotenca ekspansiisma kaj hegemoniisma politiko de Pekino, politiko konscie kuraĝigata de Vaŝingtono kaj de aliaj internaciaj reakciaj fortoj". La Rezolucio esprimas "fratan subtenon al la popoloj de Vjetnama Socialisma Respubliko, Laoso kaj Kampuĉio" kaj sian volon "kontribui al la disvastiĝo de la Internacia Lingvo en tiuj ĉi landoj". Estas formita "solidareckomisiono kun la popoloj kaj esperantistaro" de la tri landoj.

Atentaj legantoj de tiu kaj multaj aliaj similaj rezolucioj povas facile rimarki, ke ĉiam la esenca, politika parto estas ruze ligita al "disvastiĝo de Esperanto", "helpo al esperantistoj", ks. Per tio oni klopodas atingi - ne tute sensukcese - la apogon de tiuj esperantistoj, politike iom naivaj, kiuj ne vidas la ruzecon, per kiu ili estas manipolataj. Tio estas la vera senco de la alvoko al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj en la tuta mondo "liveri adekvatan helpon, kaj moralan kaj materialan, al la esperantistaj movadoj" en la tri menciitaj landoj.

Doni helpon al disvastiĝo de Esperanto kie ajn en la mondo, sed sen partipolitikaj sekvoj de tia speco, estas en ordo, kaj ĉiu sincera esperantisto tion faras laŭ siaj eblecoj; sed helpo pro partipolitikaj motivoj kaj por evidente partipolitikaj celoj estas rekomendinda nur por tiuj, kiuj subtenas la koncernan partipolitikan linion.

KIU KULPAS PRO LA INTERNACIA STREĈITECO?

Kompreneble, nur Usono kaj NATO, laŭ Deklaro, kiun akceptis publika kunveno en Sofio la 23-an de aprilo 1980 kun aktiva partopreno de reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj/instancoj el ok blokaj landoj. Laŭ tiu Deklaro, Usono kaj NATO iniciatis "la reokazigon de malvarma milito", "uzas bojkoton kaj aliajn formojn de ĉantaĝo", praktikas "novkoloniisman ekspluatadon", "bremsas la justan solvon de la konflikto en Proksima Oriento", "estigas novajn militbazojn en la regiono de la Persa Golfo kaj minacas Iranon per militoperacioj".

Kompreneble, la Deklaro eĉ ne aludas al la invado de Afganio fare de la sovetiaj trupoj - invado, kiun kondamnis UN per grandega plimulto de voĉoj, inkluzive tiujn de granda nombro da nealiancigitaj landoj - nek al aliaj intervenoj de Soveta Unio, ĉar en tiuj kazoj ĉiam temas nur pri "frata helpo" al "socialismaj fortoj" defendantaj sin kontraŭ la "agreson" de Usono, Nato kaj de ĉiuj "reakciaj, imperiistaj fortoj", ks.

APOGO DE LA VICPREZIDANTO DE UEA AL "STARTO"

Verŝajne neniu el la partipolitikaj Esperanto-periodaĵoj en la landoj de la soveta bloko faras tian vulgaran politikan propagandon, kiel *Starto*, la organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, unu el la "aliĝintaj asocioj" de UEA. En n-roj 5 kaj 6/1980 denove aperis nombro da tekstoj kun propaganda karaktero laŭ la aktuala linio de la eksterlanda politiko de Soveta Unio. Per tio *Starto* daŭrigas sian kampanjon de mensogoj kaj atakoj kontraŭ la okcidentajn demokratiojn. Pri la skribado de *Starto* kaj entute pri la bedaŭrinda submetiĝo de la Esperanto-Movado en Ĉeĥoslovakio al la regantaj politikaj fortoj en tiu lando, *Horizonto* jam plurfoje atentigis en la antaŭaj n-roj. La posthamburgaj estraroj de UEA neniam reagis, dum la Komitato de tiu Asocio, per sia rekomendo de la nuna kontraŭ-neŭtraleca Statuto, fakte kuraĝigis tian politikan aktivadon en UEA.

S-ro Renato Corsetti, unu el la du vicprezidantoj de UEA, nun eksplicite apogas ĝin, kiel informis J.T. en *Horizonto*, n-ro 32(2), p.41. En parto de letero, publikigita en *Starto* (n-ro 5/80, p.16), li skribis: "Dankon pro la senditaj n-roj de *STARTO*. Vere ni devus trovi la manieron por disvastigi ĝin ankaŭ inter okcidentaj esperantistoj". Tio povus esti utila: la "okcidentaj esperantistoj" havus tiel la okazon mem konstati pri kio kaj kiel skribas *Starto* kaj kion rekomendas la vicprezidanto de UEA. Atendante tion, *Horizonto* nur notas sen komento.

"STARTO" KAJ "HEROLDO" UNUIĜAS EN MENSOGADO

La kampanjo de mensogoj kaj ĉiaspecaj inventaĵoj pri la antaŭa prezidanto de UEA (pli frue ĝia ĝenerala sekretario kaj estrarano ekde 1938), kiu daŭras jam tre multajn jarojn en *Heroldo* de gesinjoroj Fighiera, lastatempe unuiĝis kun samspeca kampanjo de la ĉeĥa *Starto* de s-ro Krimský. Unu el la plej lastaj mensogoj meritas pro sia amuze groteska absurdeco mencion ankaŭ ĉi tie (ĝi estis dementita jam en *Horizonto* n-ro 32(2), p.42).

Starto (n-ro 6/80, p.26) citas el n-ro 14 de *Heroldo*, laŭ kiu, inter aliaj inventaĵoj kaj ofendoj, "Prof. I. Lapenna en Hamburgo akiris ne pli ol 25% da komitatanaĵ voĉoj /1974/...". Fakte, en ĉiuj elektoj antaŭ Hamburgo

Prof. Lapenna ĉiam ricevis grandegan plimulton. En la elektoj de 1974 por komitatanoj 8 li ricevis plebiscitan apogon de preskaŭ 90%. En Hamburgo mem, kiam konstatis la sukceson de la politika konspiro per la manipulita elekto de komitatanoj C (entute 13), kion li antaŭvidis en sia historia Aprila Artikolo (*Espero*, n-ro 4/74), li tuj rezignis pri ĉiuj funkcioj en UEA kaj pri sia Honora Meritbreco antaŭ la elekto de la Estraro. Sekve li ricevis nek 25%, nek kiun ajn alian procenton, ĉar li tute ne estis kandidato al kiu ajn funkcio en la Estraro. Tiel, laŭ *Heroldo* citita en *Starto*, neekzistanta kandidato ricevas "ne pli ol 25%"!

Tion scias ĉiuj, kiuj ĉeestis la kunsidojn de la Komitato en la plenstopita salono "Hodler" de la Kongresejo en Hamburgo, inkluzive membrojn de la nunaj Estraro kaj Komitato de UEA. Tamen, nek la nuna prezidanto de UEA, nek kiu ajn funkciulo de la Asocio protestis pro tiu plia inventaĵo, kiun versaĵe pluraj, aŭ eĉ multaj, neinformitaj legantoj de la du parencaj periodaĵoj rigardos vera. En la nuna UEA oni ofte kredas eĉ al la plej groteskaj absurdaĵoj, el kiuj nur unu estas menciita ĉi tie.

LINGVA ANGULO

Kiel skribi la datojn per ciferoj?

En parola lingvo oni unue indikas la tagon, poste la monaton kaj fine la jaron. En la *Fundamento* oni trovas: "*Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua*", kio egalas al: la 22-an de februaro 1732. Oni povas eĉ pli mallongigi kaj skribi: 22.02.1732.

En la lastaj jaroj, skribante la datojn per ciferoj, oni sufiĉe ofte indikas unue la jaron, poste la monaton kaj fine la tagon, tiel ke "la tria de februaro 1981" fariĝas "81.02.03", aŭ sen la nuloj. Tio povas kaŭzi konfuzojn. Se oni el-lasas la jaron, kiel tre ofte oni faras, oni ne povas scii ĉu "02.03" estas la 3-a de februaro, aŭ la 2-a de marto.

Por eviti ĉian ajn konfuzon, plej bone estas sekvi ankaŭ tiurilate la *Fundamento*, la solan garantion de la lingva unueco, kaj indikadi per ciferoj unue la tagon, poste la monaton kaj fine la jaron: 02.03.81 estas, do, la 2-a de marto 1981. La redakcio de *Horizonto* aplikas tiun principon kaj afable petas la kunlaborantojn agi same.

LA DANGĜERAJ KOLORO KAJ STELO: VERDAJ

En 1973 aperis broŝurforme *La Danĝera Lingvo: Esperanto en la Uragano de Persekutoj*, tre bone dokumentita verko de Ulrich Lins. Iom posta versio troviĝas en Ĉapitro 21 de *Esperanto en Perspektivo*. Nun montriĝas, ke eĉ la verda koloro kaj precipe la verda kvinpinta stelo estas "danĝeraj" por iuj.

Jam delonge la ĉeĥa *Starto* ne ŝatas la verdan koloron kaj la verdan flagon kun la verda stelo sur blanka fono. Pri tio skribis *Perspektivo*, la organo de la Dana Agadgrupo de la Neŭtrala Esperanto-Movado. Antaŭ kelkaj monatoj *Starto* ricevis "sciencan" apogon por sia malŝato. En *Hungara Vivo*, n-ro 3/80, aperis artikolo de Árpád Rátkai sub la titolo "Nia Plago" - kaj la plago estas, nek pli, nek malpli, la verda Esperanto-flago. Laŭ la aŭtoro, la Budapeŝta Teknika Universitato eltrovis post dekjaraj esploroj (1964-1974), ke "elekto de verda koloro estas preskaŭ la plej malfeliĉa". Tiuj epokfaraj "kolorpsikologiaj esploroj", pri kiuj, verŝajne por ne perdi sian valoran tempon, okupiĝis la Budapeŝta Teknika Universitato, evidentigis, ke "oranĝa, ruĝa kaj blua estas la plej preferataj koloroj en ĉiu aĝo kaj sekso (krom uloj kun difektita menso)". Ne estas tute klare el tiel formulita frazo, ĉu, krom uloj kun difektita menso, la oranĝa, ruĝa kaj blua koloroj estas la plej preferataj, aŭ ke nur "uloj kun difektita menso" ne preferas la oranĝan, ruĝan kaj bluan kolorojn. Sed la mesaĝo de tiu grava "kolorpsikologia esploro" estas tute klara: "Reklamfakulo prezentis la damaĝojn de la verda koloro ĝenerale, kaj de la verda stelo speciale". Tial la aŭtoro admonas: "Niaj tradiciaj flago kaj stelo, do, estu uzataj nur en niaj internaj rondoj, tre limigite kaj modeste". Alivorte: nepre ne en publikaj lokoj, eĉ ne en butontruo.

La ĉeĥa *Starto*, kiu ekscitiĝas pro la verda koloro kiel taŭro pro la ruĝa, kun plezuro reprenis la tutan artikolon en n-ro 6/80.

Feliĉe, en Hungario troviĝis ankaŭ serioza persono, kiu ne timis esti deklarita "ulo kun difektita menso" aŭ ricevi eĉ pli danĝeran kvalifikon, kaj reagis en *Budapeŝta Informilo* de februaro 1981. En artikolo sub titolo "Ĉu la 'Verdajo' estas Nia Plago?" P.A. Rados mallonge prezentas la historion de la Esperantoflago kaj klarigas ke la verdo estas "la koloro de la espero" en la eŭropa kulturtradicio. Li ankaŭ memorigas, ke la kvinpinta stelo laŭ la antikva helena filozofo kaj matematikisto Pitagoro (570-500 a.K.) simbolis la *belon* kaj *amon*. Pro la ora sekcio $a/b = (a+b)/a$, en ĝi trovebla, ĝi estis simbolo de la diino Afrodita. Ĉe mezepokaj alkemiistoj ĝi signifis la *venkon*, poste ĝi fariĝis simbolo de la *kvin kontinentoj*, sekve tiu de la *internacieco*. "Sed pli gravas" - skribas Rados - "ke en Bulonjo ĉe Maro tiu koloro kaj tiu stelo...iĝis Esperanto-simboloj, esprimantaj strebadon de nia movado pri pli justa, pli frateca mondo, kies atingon povas helpi la uzado de Esperanto". Vortoj, kiuj spegu-

las la humanecan internaciismon de la esperantismo kaj kiujn *Horizonto* kunsubskribas.

Al la trafikaj argumentoj de P.A. Rados oni povus aldoni, ke en trafiko kie ajn en la mondo la verda koloro signifas "pasu", dum la ruĝa signifas "haltu". Ĉu ne pliaj simboloj? Kaj ĉu ne estas vero, ke nur "uloj kun difektita menso", fakte difektita menso, malobservas ilin? Eble la Budapeŝta Teknika Universitato, post "kolorpsikologiaj esploroj" dum pliaj dek jaroj (se intertempe ĝi ne trovos pli aktualan esplorobjekton) povos respondi.



LA PULSARO EN LA KRABA NEBULOZO (Daŭrigo de p. 56)

Kiel oni tion konkludas, oni povas klarigi per la ekzemplo de piedpinte piruetanta glitkurantino, kiu komence turniĝas nerapide, sed iom post iom pliigas la rapidecon. Ŝi faras tion sen puŝo al la glacio, simple altirante la krurojn kaj la brakojn, kaj finfine ŝi turniĝas tute rektiĝinta. "La turnimpulso estas konstanta", oni diras en la fiziko.

Ankaŭ je tertremo la masoj moviĝas, tiel ke la turniĝo de la terkorpo ŝanĝiĝas. Steltremo de la pulsaro en la Kraba Pulsaro ŝanĝas la turniĝon de la pulsaro, kaj 3000 jarojn poste ni observas, ke la lumpulsoj ne alvenas je la supozita tempo. Tio eblas, ĉar oni mezuras la alventempojn je precizeco de eĉ 0,000 01 sekundo. Oni povas fakte mezuri ŝanĝon de la radiuso je 0,001 mm.

Tre interesa por la kompreno de la pulsaro estas granda steltremo, kiu okazis en septembro 1969, per kiu la radiuso ŝanĝiĝis je 0,1 mm. Per internacia kunlaboro oni klopodas daŭre observadi la pulsaron por havigi pli bonan komprenon pri tiu stranga astro kaj ĝia fiziko.

Oni konas entute 300 radiopulsarojn, kaj certe ekzistas en nia galaksio milionoj da tiaj, kiuj estas nesufiĉe intensaj por observado eĉ per la plej grandaj radioteleskopoj. En la fina stadio de multaj steloj ili fariĝas pulsaroj, uzinte la plejmulton de sia (atoma) energio. Sed tio estas alia rakonto.

Erik Høg

LA RUSA NOMFORMO "L. M. ZAMENHOF"

Bernard Golden

La atenta leganto eble opinios, ke la titolo de tiu ĉi artikolo enhavas preseraron; ĝi devas teksti "L.L.Zamenhof". La scivola leganto eble demandos sin: kiu estis L.M. Zamenhof?

La respondo de la unua demando estas nea; ne temas pri preseraro. Ĉi-sube estas la bezonataj informoj por povi identigi L.M. Zamenhof.

Zamenhofologoj, kiuj esploras la nomojn kaj kaŝnomojn de la aŭtoro de Esperanto, scias, ke en la unua tempo, kiam d-ro Zamenhof ne uzis sian plenan nomon - unue Lazaro, poste Ludoviko Zamenhof, li kelkfoje subskribis dokumentojn kiel L. Zamenhof aŭ tre malofte kiel L.Z. Tiam ne okazis io malkonvena, ĉar estis nur unu L. Zamenhof en la movado. Sed en 1898 unu el la fratoj de d-ro Zamenhof, Leono, esperantistiĝis. Baldaŭ li aktivis en la movado kaj ankaŭ verkis Esperante sub la plumnomo Lozo (=L.Z.). Ankaŭ li estis kuracisto. Jen kiel estiĝis ebleco de konfuzo, ĉar ambaŭ fratoj estis konataj kiel d-ro L. Zamenhof. Pro tio, Ludoviko Zamenhof je la jarcentturniĝo komencis uzi siajn du voknomojn, nomante sin Lazaro Ludoviko Zamenhof. Plej ofte li subskribis verkojn kaj leterojn kiel L.L. Zamenhof.

Ekzameno de oficialaj ruslingvaj gimnaziaj dokumentoj (vidu *Balina-Dokumento pri la studentaj jaroj de L.L. Zamenhof*, 1977, Osako) montras, kiel la juna lernanto eniris la gimnazion en 1894 kiel Lejzer, la jida formo de la hebrea biblia nomo Eliezer. Li sporade uzis la pli internacian formon de tiu nomo, Lazar, dum la sekvaj jaroj, kaj en la oka klaso en 1879 li definitive adoptis tiun voknomon. Sur kelkaj dokumentoj lia nomo estas indikita konforme al la rusa kutimo laŭ la formulo X, filo de Y. Ekzemple en atesto datita la 24-an de julio 1879, Ludoviko estas nomata Lazar, filo de Mark, kaj la patro estas Mark Fabianoviĉ Zamenhof. En la sama jaro, peticio adresita al la rektoro de la Universitato de Moskvo enhavas la nomformon Lazar Markoviĉ Zamenhof. En 1881 atesto de la rektoro de la moskva universitato nomas la studenton Lazar Motelev Zamenhof, kaj simila nomformo, Lazar, filo de Mark (Motel) Zamenhof, aperas sur la diplomo, kiun d-ro Zamenhof ricevis de la Universitato de Varsovio en 1885. Motel estas la jida diminutivo de la hebrea nomo de la patro, Mordeĥaj. La silabo -ev en Motelev estas la ekvivalento de la rusa sufikso -oviĉ, signifanta filon, kvazaŭ oni dirus en Esperanto "Motelido" aŭ "Markido". Kiam la novebakita kuracisto subskribis samjare en Varsovio sian medicinan juron, li uzis la mallongigitan formon "kuracisto L.M. Zamenhof". La identa subskribo aperas ankoraŭ unu fojon en letero adresita al la Universitato de Varsovio en februaro 1885, permesanta al Mark Fabianoviĉ Zamenhof ricevi la kuracistan di-



7-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

12 – 18 julio 1981
Altlernejo Krogerup, Humlebæk, Danio.

Koresponda adreso: S-ro cand.oecon. H.V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio.

Kiel aldono al tiu ĉi numero oni trovas la novan broŝureton pri la konferenco, al kiu ni referencas. Ni referencas ankaŭ al la tezararo de la enkonduka prelego de Prof. D-ro IVO LAPENNA presita en tiu ĉi numero (p. 49) kiel ĉefartikolo:

RENKONTE AL LA CENTJARA DATREVENO DE ESPERANTO.

Juĝisto SVEN ZIEGLER informis pri sia prelego.

LINGVAJ MALHELPOJ AL OKCIDENTEŬROPA EKONOMIA KAJ KULTURA KUNLABORO:

"Mi intencas prilumi, surbaze de propraj spertoj, la diferencon inter la teoria egaleco de la lingvoj de la Ŝtatoj-Membroj de la eŭropaj institucioj kaj la ĉiutaga praktikado, la manieron, en kiu disvolviĝas la kunlaboro en la koncernaj eŭropaj administracioj el lingva vidpunkto, kelkajn ekzemplojn de malbeloj al ties politikoj kaŭzantaj de lingvaj diversecoj kaj fine – por esti pozitiva – fari kelkajn praktikajn sugestojn pri eventuala kontribuo de la esperantistoj al pliefikigo de la eŭropa kunlaboro".

LOKA ORGANIZA KOMITATO

H.V. Rasmussen

Per via aliĝo al la INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO en kiu ajn kategorio de membreco vi kontribuas al kreo de solida materia bazo por plua regula aperado de HORIZONTO kaj de aliaj partipolitike neŭtralaj Esperanto-publikaĵoj. Aliĝojn akceptas la sekretario-kasisto, cand.oecon. H.V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio.

(Daŭrigo de p. 69)

plomon por transsendo al Vejseje, kie d-ro Zamenhof komencis sian praktikon.

Estas evidente, ke d-ro Zamenhof uzis la patronomon Markoviĉ nur sur kelkaj oficialaj dokumentoj origine skribitaj ruslingve, kiuj rilatis al universitataj kaj kuracistaj aferoj. Li verŝajne neniam subskribis iun verkon en Esperanto aŭ alia lingvo per la nomformo L.M. Zamenhof, kaj pro tio ĝi ne fariĝis vaste konata.

Bernard Golden



"Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo."

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

MIRIGA DOKUMENTO

Pri FEDERALISMO KAJ EVOLUCIO temas referato de *Burkhard Stieglitz*, FRG-Kolonjo, membro de la supernacia Eŭropa Federalista Partio kaj estro de ties Labor-komunumo Federalismo.

Ĉi tiu miriga referato estas la filozofie grandioza provo bazi la politikan koncepton de moderna federalista partio sur la evoluhistorio de la universo. Tiu e-seo, tute kapabla rabi la spiron al la leganto pro siaj science fonditaj vastaj perspektivoj, rilatigas la prakomencon de la kosmo al la ekesto de la "noosfero" (la sfero de la spirito; la pensanta tavolo ĉirkaŭ la terglobo; la plej progresema formo de la universa energio) kaj al la aktuala situacio de la homaro sur la spacŝipo TERO, kiu sekvas sian orbiton tra la senkonsole senfina malplenaĵego. Ĉu ni vere nur estas bedaŭrindaj formikoj, de ĉiu Dia estaĵo forlasitaj, sur ŝvebanta globo meze de senfina sencesceco? Tiu almenaŭ estas unu ebla aspekto de la nin ĉirkaŭanta mistera fenomeno. Sed ekzistas alia, ne facile komprenebla, tamen per la sama scienco, kiu ŝajnas rezultigi nur senkonsole nihilisman ateismon, pravigita aspekto: La kosmo evoluas, kaj ĝia evoluo montras direkton. Ĝi evoluas tra la sinsekvaj fazoj de materiigado, vivigado kaj konscia reflektado. Per la komenca prafulmo estiĝis la evoluo de la konstruelementoj de la materio, ĝin sekvas la evoluo de la organismoj kaj ĉi tiun la evoluo de la konscio. Tiuj procesoj ne estas inversigeblaj. Ĉiu nova evolufazo, ĉiu laste atingita estado de evoluo estas pli kompleksa ol la tiama laste antaŭirinta.

La plej alta pinto, la plej progresinta supro de la evoluo de la organismoj estas la homo. Kaj li, unike li, fariĝis portulo de la spirito. Post kiam unufoje la evoluo tiel decidiĝis, nek la aliaj primatoj, nek la elefanto, nek la delfeno havas la plej malgrandan ŝancon konkurenci kun la homo. Per la homo la evoluo tute transiris al la noosfero. La evoluo de la organismoj ekde tiam fariĝis kva-zaŭ seninteresa kaj pli-malpli ĉesis. (Tute same, post kiam Esperanto kiel internacia lingvo adoptiĝis, neniuj alia lingvo-projekto havas ankaŭ nur la plej mal-

grandan ŝancon povi konkurenci kun ĝi). Aktuale nun la evoluproceso atingis la momenton, kie temas pri eltrovado de la plej oportuna socia formo de kunvivado. Ĉu tiu estonte estu diktatoreco? Ĉu liberala demokratio? La homa individuo, la persono, abomenas la vivadon sub kia ajn diktaturo, ĉu faŝisma, ĉu socialisma, li aspiras liberon. Tiun ŝajnas promesi al li la moderna liberalisma demokratio. Sed ankaŭ ĝi pli kaj pli neniigas - per sia atomisme burĝeca koncepto de la socio, per sia fatale nur laŭforme demokrata koncepto de la majorio-la homan personecon. Ankaŭ ĝi ne estas libera de danĝera tendenco al centralisma principo de ĉiam kreskanta ŝtata potenco. En tiu nuna momento de la kulminanta krizo de la homara kunvivado prezentiĝas la integrala federalismo kiel ordiga principo kondukanta en liberan estontecon de antaŭen malferma kosmo.

Estas apenaŭ eble en necese mallonga recenzo eĉ nur alude trakti la kompaktan idearon de tiu referato. Certe tamen estas, ke ĝi meritas senkondiĉan, senantaŭjuĝan intereson de la Esperantistaro, kaj precipe de tiuj Esperantistoj, kiuj komprenas sin mem kiel torĉuloj de la Zamenhofa homaranismo. Federalismo kaj Esperanto renkontiĝas en komuna celo. Ilia devizo estas UNUECO EN DIVERSECO. La Eŭropaj Esperantistoj havas la plej urĝan politikan taskon kunhelpi la realigadon de Eŭropa Federacio kiel modelo por poste realigenda mondvasta federacio de federacioj.

Oni povas mendi la referaton ĉe EŬROPA FEDERALISTA PARTIO, Ĝenerala Sekretariato, zorge de s-ro Peter M. Menzi (Esperantigisto de la referato), Bürg, CH-8608 Bubikon - Zuriko, kontraŭ pago de kvin svisaj frankoj plus sendokostoj aŭ la necesa kvanto da respondkuponoj (EFP-ZURIKO, Poŝtĉekkonto n-ro 80-41196).

Rikardo Ŝulco, FRG-Mindeno

FUNEBRA SCIIGO

En profunda funebro kaj malĝojo mi informas, ke mia karega edzino, mag. **ANNA DRATWER**, naskita Bajer en Varsovio, multjara fidela esperantistino subite mortis la 17-an de marto 1981 en Bat-Jam, Israelo.

Mag. Isaj Dratwer
Varsovio — Bat-Jam

Al *mag. Isaj Dratwer* la redakcio de *Horizonto* sincere kondolencas je la forpaso de lia kara kaj ege simpatia edzino.

Kun sia edzo *Anna Dratwer* aktive partoprenis NEM-konferencojn. Ŝiaj intervenoj en diskutoj estis atentindaj, kaj cetere ŝi estis ĉiam preta helpi pri praktikaj aranĝoj. NEM perdis valoran kunlaboranton, kiu komprenis la gravan situacion de la Esperanto-Movado ekestintan en 1974 kaj tial ĉiam amike kaj instige subtenis nian Zamenhofan linion. Ŝi vivos daŭre en la memoro de ĉiuj, kiuj havis la okazon amikiĝi aŭ eĉ nur konatiĝi kun ŝi.



INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Koresponda adreso: S-ro cand.oecon. H.V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio.

FONDO KAJ CELOJ

Dum la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en Strasburgo en 1980, estis fondita la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM).

Unu el la celoj de la Centro estas manifesti kaj interne de la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi la tradiciajn kulturajn kaj ĝenerale ideajn valorojn de la partipolitike kaj religie neŭtrala Esperanto-Movado.

La Centro kunordigas la laboron de ĉiuj neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj deziras tion. Ĝi kreas financon bazon por certigi aperadon de *Horizonto* kaj de aliaj publikaĵoj, kies linio konformas al la celoj de la Centro kaj al la Deklaro de Principoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

La Centro tute ne celas fariĝi amasa Esperanto-organizaĵo aŭ konkurenci al kiu ajn Esperanto-societo. Tial ĝi havos nur limigitan nombron da ordinaraj membroj.

MEMBRECO

Kiel ordinara membro povas esti akceptita ĉiu persono, kiu parolas la Internacian Lingvon kaj ĉiu Esperanto-organizaĵo, kiu agas konforme al art. 2 de la Statuto. Krome fizikaj kaj juraj personoj povas esti akceptitaj kiel neordinaraj membroj. Informoj pri membrokategorioj kaj iliaj kontribuoj kaj kotizoj troviĝas en la sube menciitaj broŝuro kaj aliĝilo.

PLENUMA KOMITATO

En Strasburgo estis elektita la unua, provizora Plenuma Komitato, kies ĉefa tasko estas ekfunkciigi la Centron, kaj kiu konsistas el:

Prezidanto Prof. D-ro IVO LAPENNA, 77 Grasmere Avenue, Wembley,
HA 9 8TF, Middlesex, Britio.

Vicprezidantoj D-ro KLAUS PERKO, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio.
S-ro JEAN THIERRY, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio.
F-ino MARIANNE VERMAAS, Nieuwe Binnenweg 70, I,R, 3015 BC
Rotterdam, Nederlando.

Sekretario-kasisto S-ro H.V. RASMUSSEN, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngby, Danio.

LA CENTRO KAJ HORIZONTO

Ĉiuj membroj de la Centro ricevadas senpage la revuon *Horizonto*, sed tiu periodaĵo, eldonata de la *Eldonejo Perspektivo*, estas ankaŭ aparte abonebla rekte ĉe la eldonejo aŭ pere de la perantoj, kies nomoj kaj adresoj aperas sur la dua kovrilpaĝo.

ALIĜILOJ KAJ PAGOJ

Apartan broŝuron kun la Statuto de la Centro, Deklaro de Principoj, Rezolucio de la Konferenco de Ateno, ĉiujn aliajn informojn kaj aliĝilon bonvolu havigi ĉe la sekretario-kasisto. Li akceptas la aliĝojn kaj kotizojn (postĉeka konto de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado: Kopenhago 1 19 06 01). Bonvolu atenti: Se por iu deziranta aliĝi estas pli facile pagi al la prezidanto aŭ al unu el la vicprezidantoj, li/si povas pagi la kotizon ankaŭ tiamaniere, kaj la koncerna funkciulo de la Centro ordigos tion kun la sekretario-kasisto.


VERKOJ DE IVO LAPENNA

Verkitaj en la Internacia Lingvo.

Ĉiuj inspiritaj de humaneca

internaciismo.

Ĉiuj verkitaj en **modela Esperanto.**



RETORIKO, la plej legata libro de la postmilita periodo, jam pli ol 5.500 ekzempleroj disvenditaj, 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 8 anglaj pundoj, 80 danaj kronoj aŭ egalvaloro, 2-a eldono, bindita, nur 6 anglaj pundoj aŭ 60 danaj kronoj (nur kelkaj ekzempleroj).

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ, komplemento de *Retoriko*, 152 p., fortike broŝurita, prezo 5 anglaj pundoj, 50 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO, polularscienca kaj interesa por ĉiu klera persono, broŝurita, prezo 3 anglaj pundoj, 30 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO (ĉefadtoro kaj ĉefredaktoro), monumenta, reklamata de UEA kiel "enciklopedio de la nuna tempo", tamen ne komplementa sen *Hamburgo en Retrospektivo*, bindita, ilustrita, 876 p., ampleksaj persona kaj tema indeksoj, prezo 84 ned. gld., 215 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO, konsiderinde kompletigita eldono, lukse broŝurita, 152 p., prezo 5 anglaj pundoj, 50 danaj kronoj, 18 germanaj markoj, 40 fr.fr., 650 pesetoj aŭ egalvaloro.

Prezoj ekde la 1-a de junio 1979. Ĉiuj supraj libroj estas en la sama formato de 20,5 x 14 cm.

Mendeblaj ĉe nia **LIBROSERVO de NEM**, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando. Kun ecepto de *Esperanto en Perspektivo*, la librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la *aŭtoro*: 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex HA9 8TF, Britio, laŭ la prezoj indikitaj en anglaj pundoj.

Krome, unuopaj ekzempleroj de *Hamburgo en Retrospektivo* estas mendeblaj ĉe s-ro *Jean Thierry*, 5, rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio, aŭ ĉe bonaj libroservoj. Pli grandaj kvantoj mendeblaj nur ĉe **ELDONEJO PERSPEKTIVO**, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando, kun jenaj rabatoj: 33% ĉe mendo de minimume 5 ekzempleroj plus 10% por afranko, 33% sen afranko ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj.

En ĉiuj aliaj kazoj bonvolu ĉiam aldoni 10% por la afranko.

LA SUPRAJ VERKOJ DE IVO LAPENNA estas pli aktualaj nuntempe ol iam antaŭe. Ili donas klaran, science bazitan eksplikon pri la esenco de la Internacia Lingvo (Esperanto), pri ĝia rolo en la hodiaŭaj kaj estontaj internaciaj rilatoj kaj pri ĝia monde solidara funkcio. Samtempe, kune kun la artikoloj en *HORIZONTO*, ili estas la plej trafa respondo al la pseudosciencaj skribaĵoj de la sovetismaj ideologoj en la posthamburga UEA kaj ĝenerale en la Esperanto-Movado.

MENDU TUJ KAJ ATENTIGU VIAJN GEAMIKOJN

Helpu pluporti la torĉon de la *zamenbofa esperantismo*

LIBROSERVO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO,
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danlando.